**La babiladaj rondoj okazas vendrede je la 19-a horo.**
La gastiganto informas per *Doodle*, kion li preparos por manĝi kaj kion la gastigantoj povas alporti. https://doodle.com/poll/8dk45bkb8brdf2nd

**Ambaŭgrupa babilada rondo: Ve, la 15-an de februaro**
Charlotte, Marie-Antoinette kaj Knud invitos nin en Montreux, avenue des Alpes 150. Aliĝu al; https://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6

**La Kasta Festo**, rue de Montbrillant 20 en Ĝenevo, organizota de *La Stelo*, okazos **sa**, **la 23-an de februaro** (projekciado de nia filmo) kaj la 25-an de majo, je la 18-a kaj 30.

## La komitato informas ...

### Tagordo de la asembleo:

1 - La tagordo 2019.
2 - La protokolo de la asembleo 2018.
3 - Raporto de la prezidanto.
4 - Raporto de la kasisto
5 - Raporto de la kaskontrolantoj
6 - Voĉdono pri la raportoj.
7 - Mortintoj
8 - Demisiantoj
9 - Novaj membroj
10 - Kotizoj
11 - Informilo
12 - Elekto de la komitato
13- Elekto de la kaskontrolantoj
14 - Dataro
15 - Informoj, proponoj kaj diversaĵoj


## Laŭzana Esperanto – Societo

F. Randin – ch. de Vallombreuse 14 * CH – 1004 LAUSANNE
+41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
https://www.facebook.com/esperantolausanne
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8
Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55
Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier kaj Rosario Scopelliti


# Laŭzana Esperanto-Societo


La lasta **Informilo** en tiu formo — Februaro 2019 – n° 02


Kunsidoj normale okazas ĉiumonate
ĉe Espace Dickens, rue Dickens 6, Lausanne

Lunde, la 4-an de februaro je la 20-a.

## Ĝenerala Asembleo




Lunde, la 4-an de marto
- Decidota

Lunde, la 1-an de aprilo
- Ŝercadoj

Lunde, la 6-an de majo
- Decidota

Sabato en junio
- Ekskurso




**HORIZONTALAJ DIFINOJ ( → )**
**1.** Heroa, grandioza; **6.** Bonfartus; **7.** Nacia domajno de la alta nivelo de Taĝikio; **8.** Simbolo por plateno je kemio; **9.** Inter martelo kaj amboso; **11.** Modere trinkanta kaj manĝanta.

**VERTIKALAJ DIFINOJ ( ↓ )**
**1.** Esti (preterito); **2.** Laŭ la greka mitologio, estis dio de la paŝtistoj; **3.** Mallongigo de Ontario; **4.** Sub (kontraŭo); **5.** Kometo estas malgranda ___ korpo; **10.** Simbolo por terbio je kemio.

# Protokolo 2018 de la ĝenerala asembleo de LES

okazis la 5-an de februaro ĉe la salono 3 de "Espace Dickens" en Laŭzano.

Ĉeestis 18 aktivaj membroj:
David Buhlmann (prezidanto) - Charlotte Blanc Maillard (vicprezidanto) – François Randin (sekretario) - Knud Sunier (redaktoro de la informilo) - Rosario Scopelliti – Giulio Grigoletto – Monique Golaz - Marie-Antoinette Sunier - Pierre Delaunay - Gilbert Darbellay - Cléa Robin - Pierine Bonjour – Anne-Lise Romang - Sarah Meigniez - Nancy Fontannaz - Toos Godat - Elisabeth Renaud - Cédric Bornand - Romeo Bornand (invitita)
Ĉeestis 2 kandidatoj: Gérard kaj Geneviève Corpataux
Senkulpiĝis 5 aktivaj membroj: Lucienne Dovat - Françoise Pétermann (kasisto) - Markus Sanz - Sylvain Meigniez – Maryse Tissot

**La prezidanto malfermas la asembleon je la 20h06.**

**1- La tagordo** estas akceptita unuanime.
**2- La protokolo de la lasta asembleo** estas akceptita unuanime.
**3- Raporto de la prezidanto:** David Buhlmann raportas pri la diversaj eventoj dum 2017/2018.
**4- Raporto de la kasisto:** Françoise Pétermann nun ferias kaj senkulpiĝis por hodiaŭ. Rosario Scopelliti, la ĉefkaskontrolanto, legas la kontojn. La kapitalo fine de 2017 estis je **sFr 878.60**
**5- La raporto de la kaskontrolantoj** subskribita de Rosario Scopelliti kaj Elisabeth Renaud estas legita.
**6- Voĉdono pri la raportoj:** La raportoj de la prezidanto, de la kasisto kaj de la kaskontrolantoj estas kune akceptitaj unuanime.
**7- Mortintoj:** Bonŝance neniu mortis.
**8- Demisiantoj:** La komitato de LES ricevis leteron de **Christiane Andreae,** kiu deziras ne plu membri en nia societo kaj demisias pro privata kialo. **Markus Sanz** deziras membriĝi en Ĝenevo kaj ne plu havas tempon partopreni en Laŭzano.
**9- Novaj membroj:** Gérard kaj Geneviève Corpataux ŝatus membriĝi en nia societo. Ambaŭ estas akceptitaj kiel aktivaj membroj.
**10- Salonpagoj kaj kotizoj:**

> *Memore: ĝis nun la kotizo estas por la aktivuloj : po sFr 50.- kaj por la pasivaj membroj : po sFr 30.-. Por la junuloj : po sFr 10.-. La aktivaj geedzoj povas pagi sFr 80.-. Tio ne ŝanĝis de multaj jaroj.*

La komitato proponas altigi la kotizon de la aktivaj membroj de sFr 50.- al sFr 60.-, tiel la kaso pagos la luadon de la salono en Espace Dickens (lundaj kaj babiladaj kunsidoj). La aktivaj geedzoj pagos sFr 100.-. Propono akceptita.
**11- Informilo:** Knud Sunier redaktas la informilon. Nancy Fontannaz daŭre konsentas korekti ĝin. Ni dankegas ŝin per donaco de floroj kaj ĉokolado.
Francisko Randin, ĉiumonate, perrete sendas nian gazeton al la aktivaj membroj. Li nur perpoŝte sendas ĝin al la aktivaj membroj, kiuj speciale mendis tion. La kaso pagas la sendajn elspezojn. Dankon al ĉiuj pro tiu grava laboro.
**12- Elekto de la komitato:** La komitato nombras 5 membrojn, kiuj estas unuanime reelektitaj:

**Prezidanto : David Buhlmann - Vice-prezidanto : Charlotte Blanc Maillard**
**Kasisto: Françoise Pétermann - Sekretario: Francisko Randin**
**Redaktoro de la informilo: Knud Sunier**

**13- Elekto de la nova kaskontrolanto:** Elisabeth Renaud prezidos en 2018. Toos Godat estas elektita kiel dua membro.
**14- Dataro**:
**a) La kutimaj kunsidoj** normale okazas - je la 20-a - ĉiun unuan lundon de la monato, escepte en junio, julio, aŭgusto kaj decembro.
**b) La kutima ekskurso** okazas unu sabaton mezjunie. La komitato ĉijare proponas **sabaton, la 23-an de junio** (ĉar la studsabato en CDELI okazos la 16-an). 3 celoj estas proponitaj: la trajneto de Morges, la abatejo de Saint-Maurice kaj la ĉokolada firmao en Courtelary. La ekskurso en Morges estas elektita kaj Cléa Robin organizos ĝin.
**c) La Zamenhofa Festo** decembre okazas kiel eble plej proksime al la 15-a. Ĉijare ĝi okazos kiel kutime en la restoracio *"Auberge Communale d'Epalinges"*, **sabate la 15-an de decembro** - naskiĝtago de LL Zamenhof mem.
**d) La librotenado** de LES fermas la jarkonton je la 31-a de decembro.
**e) La Ĝenerala Asembleo** okazos **lunde la 4-an de februaro 2019.**
**f) La babiladaj rondoj:** Ĉiuj datoj aperas en "doodle". Pri la babiladaj rondoj ambaŭgrupaj en *Espace Dickens*, la komitato proponas, ke la gastigantoj preparu terpomojn kaj desertojn kaj la gastoj alportu fromaĝojn, aperitivaĵojn kaj trinkaĵojn. La salono estas pagata el la kaso.
**g) La budo en la bazaro:** Nia ĉeesto en la bazaro normale okazas dufoje monate inter majo kaj septembro, sabatmatene de la 9-a ĝis la 12-a. Ĉijare, la asembleo proponas ne ĉeesti en la Palud, ĉar la sabatoj estas rezervitaj por la filmado.
**15- Informoj, proponoj kaj diversaĵoj**:
**a) Ekspozicio:** Mirejo Grosjean venis serĉi la ekspoziciaĵojn ĉe Knud kaj Marie-Antoinette cele al preparo de ekspozicio en Neuchâtel. Ni ne scias kiam.
**b) La 120-a naskiĝdatreveno de USL** okazis la 6-an de decembro 2017. Kvar el ni partoprenis la vesperon kaj spektis la filmon realigitan por tiu festo.
**c) La biblioteko** funkcias kaj disponeblas ĉe Charlotte Blanc Maillard, Vevey. Eblas mendi ĝiajn regulojn kaj la libraran liston rekte al nia vicprezidantino.
**d) La Stelo:** La komitato proponas, ke LES pli bone kunlaboru kun la Ĝenevanoj. Por informo: La ĝeneva societo ĉiumonate invitas la esperantistojn al la "Kasta Festo". Do partoprenu !
**e) La 103-a UK en Lisbono - Portugalio:** de la 28-a de julio al la 4-a de aŭgusto. Cléa, Elisabeth, Gilberto, Karlota, Rosario kaj Francisko partoprenos.
**f) Kurso de esperanto al la rifuĝintoj**. Ni konservas la ideon instrui esperanton en la centroj de la laŭzana regiono por 2019.
**g) FESTILANGUES organizita de la Stelo** okazos sabate, la 14-an kaj dimanĉe, la 15-an de aprilo en *Centro Naturo kaj Medio* en Lullier (ĝeneva kantono).
**h) La filmo "LA MAGIA LANDO":** La filmista grupo preparis la scenaron en 2014. La filmado komencos en 2018, sabate la 28-an de aprilo. Romeo Bornand, filo de Cédric, ludos la ĉefan rolon. La scenaro estas disponebla al la mendantoj. La komitato lanĉas partoprenan financon ĝis la 28-a de februaro 2018.

**La prezidanto fermas la asembleon je la 21h48.**

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| E | P | O | S | A |
| S | A | N | U | S |
| T | J | | P | T |
| I | N | T | E | R |
| S | O | B | R | A |



La sekretario : Francisko Randin